

Radio Ĉerizo hodiaŭ invitas vin al facila biciklado.

Antaŭ 30(tridek) jaroj, iu fervojo kuris de Ijuin ĝis Makurazaki, laŭ okcidenta marbordo de duoninsulo Sacuma, Kagoŝimo. La nomo de la linio estis Nansacufervojo, fervojo de suda Sacuma. Mia patrino rajdis tiam ruĝan vagonaron por vidi mian unue naskitan filinon kun famaj dolĉaj Ijuin-manĝuoj kiel donaco.

Nuntempe la reloj estas tute forprenitaj, kaj la vojo estas forgesita, kovrite de sovaĝaj arboj kaj herboj. Tamen ties kelkono fariĝis biciklovojo 24 km (dudek kvar kilometrojn) longa. Nun, ni biciklu laŭ la vojo suden!

Radoj komenciĝas kuri, vidante sablan marbordon dekstre, nome Orienta Ĉina Maro, kaj pasas maldensan pinarbaron. Post minutoj mi preterpasas la kajon de malnova stacio, nur ŝtonoj estas restantaj. De tie la vojo kudras inter domoj kaj arboj, kaj arbofolioj kovras la veturirejon tie kaj ĉi tie; mi tenas la stirilon firme, metante ambaŭ manojn sur bremsomaniloj, kaj atente evitas glitan falrenversiĝon, kontraŭ vundo.

La vojo kondukas min al turmentoplena suprenira deklivo

kaj malsuprenira kun orelsusura afabla vento, trans riveretoj aŭ akvovojoj, kaj pontetoj. Sin svingas flavaj krizantemoj, kreskantaj rizo-spikoj, grandioze pompaj tabakofolioj, kaj eĉ herboj nomo-nekonataj. Ĉiele pepetas birdoj senĉese, kaj audiĝas kantoj de ugvisoj. De rizkampo ekflugis ardeo, surprizite de mia rajdoveno.

Jen aperas anonctabulo apud la vojo, kio diras "ATENTON AL VIPURO!" Vipuro estas venena serpento. Tamen oni jam purigis la malhelan kaj malsekan vojon, kio ne sentigas danĝeron. Sed pro timo mi kuras pli rapide la deklivon supren, forte trotigante pedalojn.

Tra tunelo aperas la parko de najbara urbeto, kaj mi ripozas minuton trinkante akvon. Jam duonhoro pasis. Mi estas ankoraŭ duonvoje.

Ĝis la sekvanta urbo kuras arbara vojo, kaj fine aperas la bela longa ponto nomita "Sunsubira Ponto", kio kurbiĝas kiel ĉielarko. Iam vidis mi nikttereŭton, tio estas "tanuki" japanlingve, simila al bruna urseto. Iam vidis mi longan serpenton kuŝantan survoje, apenaŭ preterkurante kun korbatoj pro surpriziĝo. Eble la saman vidis mi la sakvantan tagon. Krome, ie estas anonctabulo "ATENTON AL APRO!", tio estas sovaĝa porko.

Post 3(tri) horoj mi revenas al la elirpunkto. Problemoj estas du. Unue, korrumpa kruta deklivo kuŝas inter mia hejmo kaj elirpunkto. Due, malbona vetero daŭre ĉenas min en domo. Baldaŭ venas pluvosezono.

Hodiaŭ Radio Ĉerizo invitis vin al ĝoja biciklado. Anoncis Belmonto el suda Japanio. Karaj aŭskultantoj, ĝis reaŭdo.

Klarigo de Propraj Nomoj -

esperante	latinlitere
kanae	ideograme

Iĵuin I[zyû/zyû/ju]in
いじゅういん 伊集院

Makurazaki Makurazaki
まくらざき 枕崎

Sacuma Sa[cu/tu/tsu]ma
さつま 薩摩

Nansacu Nansa[cu/tu/tsu]
なんさつ 南薩

**en [] estas montritaj skribmanieroj
novjapana/registara/hebona.*

ekz. Sa[cu/tu/tsu]ma estas:
Sacuma novjapana sistemo
Satuma registara sistemo
[kunrei-sistemo]
Satsuma hebona sistemo